

Savoir sans Frontières

AVENTUROJ DE ANSELMO LANTURLUP'

LA EKONOMIUMO

Jean~Pierre Petit

Esperantigita de :
Roland Platteau kaj Pierre Chibleur




<http://www.savoir-sans-frontieres.com>

Savoir sans Frontières

Association Loi de 1901
Villa Jean-Christophe, 206 Chemin de la Montagnère, 84120 France
<http://www.savoir-sans-frontieres.com>

Président : Jean-Pierre Petit



L'asocio Scio sen Landlimoj, fondita kaj prezidata de S-ro Jean-Pierre Petit, astrofizikisto, celas disvastigi sciencan kaj tehnikan konon en kiel eble plej da landoj kaj en kiel eble plej da lingvoj. Tiucele ĉiuj liaj popolsciencaj libroj, verkitaj en la daŭro de tridek jaroj, kaj aparte la bildstriaĵ albumoj, kiujn li desegnis, estas nun libere alireblaj. Ĉiu ajn estas nun libera kopii la ĉi-jenan dosieron, ĉu en cifereca formo ĉu kiel presaĵon, kaj disvatiĝi ilin al bibliotekoj, ĉu lernejoj, ĉu universitataj, ĉu asociaj, kies celoj estu samaj kiel tiuj de l'asocio, kondiĉe ke ili ne ricevu monprofiton el tio, kaj ne havu ajnan politikan sektecan aŭ religian karakteron. Tiuj pdf-formataj dosieroj povas ankaŭ esti alŝutitaj en informadikaj retoj de lernejoj kaj universitataj bibliotekoj.

Johano-Petro Petit planas krei multajn aliajn tiajn verkojn, kiujn li disponigos al pli ampleksa legantaro. Eĉ neleĝpovaj homoj povos legi ilin, pro tio ke la skribitaj partoj «parolos» kiam la legantoj suklikos ilin per la komputilo. Tiamaniere estos ebla utiligi tiujn verkojn por helpi al planon de legadinstruo. Aliaj albumoj estos «dulingvaj», en tio, ke estos ebla iri de traduko al alia inter elektitaj lingvoj per komputila kliko, kio estos alia maniero disvolvi prilingvajn kapablojn.

Jean-Pierre Petit naskiĝis en 1937. Li kariere kiel franca scienca esploristo. Li laboris kiel fizikisto pri plasmaj, estris komputadan centron, kreis programojn, publikigis centojn da artikoloj en sciencaj revuoj, pri temoj irantaj de meĥaniko de l'fluaĵoj ĝis teoria kosmologio. Li publikigis pr. tridek librojn, kiuj estis tradukitaj al multaj lingvoj.

La asocion oni povas kontakti ĉe la jena retejo :

<http://savoir-sans-frontieres.com>

Bankaj informoj por Francujo : t.e. Relevé d'Identité Bancaire (RIB) :

Establo	Giĉeto	Bankkonto	N° ŝlosilo RIB
20041	01008	1822226V029	88

Banko : La banque postale
Centre de Marseille
13900 Marseille CEDEX 20
Francujo

Por aliaj landoj : International Bank Account Number (IBAN) :

IBAN
FR 16 20041 01008 1822226V029 88

kaj : Bank Identifier Code (BIC) :

BIC
PSSTFRPPMAR

La statusoj de la asocio (en la franca) disponeblas ĉe lia retejo. Ties librotenado legeblas enrete, en reala tempo. La asocio deprenas el tiuj donacoj nenioman sumon, krom la kostoj pro bankaj servoj, cele al tio, ke la sumoj pagitaj al la tradukintoj estus netaj.


La asocio pagas salajron al neniuj el siaj anoj, kiuj ĉiuj estas volontuloj. Tiuj pagas mem la funkciigajn kostojn, mastrumadon de la retejo, kiuj ne estas elportataj de la asocio.

Tial vi povas esti certaj, pri tiuspeca "homama kultura agado" ke, kiu ajn estus la sumo, kiun vi donas, tiu ĉi estos 100% uzita por pagi la tradukintojn.


Ni enretigas meznombro po deko da novaj tradukoj en monato.

PROLOGO

Estis iam en Bordurio ...



« Ni » fabrikas potojn !



Sed, furzulo, ĉesigu moviĝadi,
mi devas ŝarĝi la vararon !



Ha jen Krumir, kiu alvenas.



VARINTERSANGO

Nu, prenu kvar fiŝojn por unu poto.

Ne, mi volas
ses !

Ili bezonos sufiĉe longan
tempon por **FIKSI LA KURZON.**
Ĉu vi bone fartas ?




Nu mi fiŝkaptas por li ...



Kaj li lasas por mi nur kion, mi bezonas por ne morti pro malsato. Sed, kion mi povas fari ? La rivero apartenas al la krumira kasto, kaj mi estas Etulano. Laŭ la **LEĜO**, nur la Krumiranoj rajtas ekspluati la riveron, kiun donis al il ilia dio Kefal'.




Jes mi scias, ni havas similan umon en Bordurio.




Jen vi manĝu !

Tiel pasadis la tempo. La Borduranoj, kiuj scipovis fari potojn, interŝanĝis ilin kun la Krumiranoj kontraŭ fiŝoj. La sudaj Polakanoj ilin provizis per salo. Kaj kun la salo, ili povus pekli la fiŝojn kaj meti tiujn en potojn, kio ebligis interŝanĝon kun la Polakanoj, kaj siavice, la Polakanoj ...

IUN TAGON ...



Aĉaj reŭmatismoj !
Vi iros ĉe la Krumiranoj kun la potoj.
Sed por, ke ili ne superruzu vin,
mi lernigos vin **KALKULI**.



KALKU... kio ?

LIBROTENADO


Mi tuj instruos al vi la **SEKRETON DE LA FINGROJ**.
Aŭskultu, stultulo, ĉu vi vidas viajn manojn ? Tie vi vidas fingrojn ?
Kaj ĉiu fingro posedas falangojn ?



Mi devus ne lerni tion al vi. Sed se mi ne faras ĝin, la Krumirulo vin superrozozos kiel simplulon.



Kaj ne ŝatas mi,
ke oni min superruzas.



Vidu, vi uzas vian dikfingron por tuŝi
viajn falangojn, laŭ tiu ĉi ordo. Kaj kiam
vi estos fininta, tio faros **DEKDUON**.
Vi uzos arbŝelojn, por marki ĝin. *

Iru kaj ne rivelu tiun sekreton
al iu ajn, se vi faros tion, la dio
Volstrito punos vin. Kaj revenigu
al mi viajn kalkulojn ! ...




Kaj se vi ŝtelas min,
mi senhaŭtigos vin !

* Noto de la tradukinto :
vd André Cherpillod, «Historio de la ciferoj» Courgenard 1996.

NASKIĜO DE LA MONO



Mi havas pli bonan solvon. Ĉu vi vidas tiujn aĵetojn el fero ?
Ĉiu el ili **BILDIGAS** unu fiŝon.



Jes mi bone vidas tion,
sed kion diros mia mastro,
se anstataŭ bonaj fiŝoj mi alportas
al li tiujn etajn objektojn ?


Tiuj fiŝoj el fero estas tre priserĉataj, sciu.
Foje la sudaj Polakanoj interŝanĝas ilin kun mi kontraŭ nutraĵo.
Tiuj, kiuj ĉesas, scias kiel fari el ili sagopintojn, kaj laŭdire
se oni fandas ilin, oni povas fari ankoraŭ multe pli da aĵoj.



Mi ne konsentas; mi ne **FIDAS** vin.
Ili estas etetaĵoj. Mi estos batata.

Kiel vi faros viajn kalkulojn kun viaj potoj ?
Tiu sistemo simpligas al vi la vivon :
unu fiŝo, unu objekto, kaj same sinskve.

Tiel vi ne povos erari.
Kaj, vidu, vi povas ilin aranĝi
en kolieron : vi vin gardos tiel ilin
perdi laŭlonge de la vojo ! (*)




(*) Kutimo reuzita multe pli malfrue
en certaj mediteraneaj vilaĝoj.

KOMERCO



La **MONO** ebligas do fari transakciojn sen, ke ili necesigu interŝanĝon de varoj tuj uzeblaj, konsumeblaj. La Iksbrulo uzas la metalajn monerojn por transformi siajn potojn en viandon kaj alkoholon akceptante teni objektojn, kiujn li ne povas rekte uzi, sed kiuj iam servos al li kiel **MONO** de **INTERŜANĜO**.



Interesas min la malpezeco.

KONSUMADA CIVILIZO

Mi faris decidon. Vi ankoraŭ faros pli da potoj, amase. Kaj anstataŭ interŝanĝi ilin kontraŭ veraj fiŝoj, vi revenportos tiujn etajn objektojn, kun kiuj mi aĉetos viandon kaj multe da medikamento.




Kaj kio ŝanĝis por vi,
kiam vi produktis trifoje pli da potoj ?
Trifoje pli ol viaj **BEZONOJ** ?



Be, anstataŭ suĉi fiŝostojn, mi ronĝas bestostojn.




La sudaj Polakanoj militadis iom hazarde al iu ajn. Ili fine incitetis la reĝon NUMIS, kiu atakis ilin. Tion farinte, li plivastigis sian superregadon sur la tuta lando. Li trovis tiun ideon de malgrandaj metalaj fiŝoj tre amuza, kaj li rabis la minejojn kaj fandejojn. Nun havas li ekskluzivecon en la afero, kaj metas sian markon, sian personan sigelon, sur la moneroj.




LA MONA MASO


Ĉe la reĝo NUMIS :



Tiu eltrovo de la Polokanoj,
la ... **MONO** ... estas mirige ! Ni estas
povontaj aĉeti la tutan Teron !



La Teron,
Reĝa Moŝto ?
L'Universon ! ...



Vi pravas : ni aĉetu la Universon !

Aferoj bonege rulas, Sofio. Mi ricevas nekredeblajn mendojn
de la reĝo NUMIS. Li decidis invinti ĉe sia tablo ĉiujn loĝantojn
de la Tero, kaj li volas neverŝajnajn kvantojn da konservitaj fiŝoj.



Ni plivastigos la fiŝkaptadon.
Vi estas teksonta gigantan reton,
kun kiu ni dragos la lagon !

Al mi venigu la monon !



Rilate Anselmon, li devis elfari por la Iksbrulo de Bordurio
neimageblan kvanton da potoj.

Tio estas unu mano da manoj da manoj (*)



Vi aludas tiujn sagopintojn.
Sed ni havas sufiĉe da ili
maljunulo ! Ĉiuj niaj saguoj estas
plenaj. Ni ne plu bezonas ilin.

Kaj cetera ...
fero, estas
nur fero ...



Limokaze,
ni konsentus kvar
manojn da pintoj
por unu litro.

Sed ĉe la alia ekstremo de tiu ĉeno,
inter la Tajakuloj ...

Ducent litroj da medikamento por via
spirito-en-la-piedo, ĉu vi blagas !?



Sed ... mi havas
por **PAGI**... mi havas
monon


Sed ... vi ne rajtas fari tion.
Unu litro valoris unu pinton !
Mi povas premdevigi vin
interŝanĝi je tiu prezo !



Ha ? Bone. Iru por serĉi la rezinon
kaj la kokinajn plumojn.

(*) $12 \times 12 \times 12 = 1728$

(Unu mano entenas dekdu falangojn)



Se ni petus al la polakanoj,
ke ili solvu tiun krizon ?

Ve, Reĝa
Moŝto, ĉiuj estis
palisumitaj.

Ha... domaĝe.

Kiam ni dissendis tiun **MONON**,
la **PREZO** de unu fiŝo estis unu fera
monero. Kaj poste ni volis dissendi pli
da mono, kaj la prezo **ALTIĜIS**.

Necesas ĉesigi
tuj la produktadon
de tiuj moneroj.

Sed en la Krumira lando, la porprestiĝa operacio lanĉita de la reĝo **NUMIS**
havas aliajn konsekvencojn :

Jen kio vi alportas,
hundinaĉo !?! ...

Estas senutile, ke vi nervoziĝas. Kun tiu freneza mendo,
ni amaskaptis la fiŝojn, kaj dezertigis ĉiujn fundojn.

La fiŝa kvanto duoniĝis ? Por gardi mian **GAJNON**,
mi simple duobligos la prezojn.

OK MANOJ
DA
MONEROJ
POR
UNU FIŜO

Sed, vi petas ok manojn da moneroj !!!
Via fiŝo iĝas **MULTEKOSTA** ...

KIO MALMULTAS MULTEKOSTAS

Vi vidis Moŝto, la fiŝo malmultas, tial ĝia prezo altiĝas.
MALMULTECO PLIGRANDIGAS LA VALORON.



Nian monon ni eble ne tre bone elektis.
La fero iĝas ordinara produkto. Oni faras
el ĝi ĉarajn radojn. Metalurgio disvolviĝas.
Pli bone ni faru monon el io, kiu **MALMULTAS**.

Kion vi sugestas ?



ORO



Vi pravas. Oron oni
ne povas facile akiri.
Neniam estos grandaj
kvantoj da ĝi en la
estonteco ...



Kaj ĝi ne korodiĝas.

Sed estas io, kio
turmentas min : oni
ne povas **UZI** tiun
oron. Estas sufiĉe
mola metalo.




Kial vi volas, ke ĝi
utilu al io ajn ?


Mi ne scias ... Oni povis fandi la feron.
Tiel oni povis fabrikii el ĝi amason da **UTILAJ**
objektoj. Ekzemple sagopintojn aŭ najlojn...




KONSUMEBLAJN
objektojn.



Nu, mi trovis utilecon
al oraĵoj ...




LA BANKO




INFLACIO PER MENDADO

Ĉiuj el vi aŭskultu ! Vi, kiuj vojiras kun nuda kapo, sen ŝirmado kontraŭ la kosmaj atakoj, malbonaj feoj, negativaj ondoj, kaj sunaj radioj, surkapigu tiun burdurian ĉapelon originalan, kiu faros el vi ĉefon acetu niajn Ĉef-ĉapelojn !



ĈI-TIE ONI VENDAS
ĈAPELOJN POR ĈEFOJ

Ne stulte perdu vian tempon sur la lernejbendoj, nia GNOSTIK-FILOZOFIA ĉapelo alportos al vi ĉiujn la konojn, kiuj mankas al vi per TRACERBA DISKONIGADO.



Anselmo Lanterno, ĉi-jena, kiu estis plena stultulo, lernis la SEKRETON DE LA FINGROJ per nia ĈAPELO POR ĈEFOJ.

Tamen, por REKLAMO, la Iksbrulo estas ĉampiono !



Anselĉjo, negocoj iras beste bone !



kvindek gulbaroj,
fratulo !

Restas nur
tri ĉapeloj
mastro !

Kio !?! Do mi petas sesdek !

Sed ... vi altigas prezojn ?

Junulĉjo, la dio Volstrito diktas prezojn. Kaj se ili plupetas niajn varojn, tio signifas, ke ĝi ankoraŭ ne estas sufiĉe multekosta !

Por kuiri ĉi tiujn stultajn potojn, ni ĝistere hakis la plenan arbaron.



Mi ĉion antaŭvidis, Anselmo. Nun ni kuirus niajn potojn per tiu nigra oleo, tiu nafto.

Kia naŭzigaodoro !


Turnu, kaj ne zorgu pri la cetero ! ...

INFLACIO PER LA KOSTOJ





Iun tagon ...



Mastro, nun mi ne plu povas elteni. Dum vintro mi suferas pro malvarmo. Ĉiujn tagojn mi malsatas. Kaj tio de tiom da jaroj, dum vi vin plenŝtopas kiel porko ! ...



Ho jes, mi bone komprenas :
Estas tiu ulinaĉo, kiu laboras
ĉe la lago, kiu enkapigis
al vi tiujn ideojn ! ...




Ŝajnas, ke tie la homoj starigis
«koopernan societon», io kia tio !



Mi volas po kvin
gulbarojn tage ...

... kaj unu tagon
semajne por ripozi..

Kvin gulbaroj tage !
Sed vi volas, ke mi mortu !



Vi volas puŝi
nin en ruiniĝon !

Ĉu vi volas frakasi la entreprenon ?
Mi jam devas pagi la nafton,
kies prezo senĉese altiĝas !



Vi nur trinku malpli da ...
medikamento !

Po kvin gulbaroj tage ...



Je Volstito,
estas
inkubsonĝo.

Aŭskultu, se vi
diligente laboros, pli poste,
mi estos bonkora.



Ne, pagu
tuj la kvin
gulbarojn !

Sed kion vi faros
per tioma sumego ?



Mi aĉetos ĉemizon,
kaj pecon da sapo !



Aĥ jen, vi ĉion konfesas ! Unue la lukson,
poste la diboĉon, fiknabo !

Fek ! Pri kio
vi zorgas ? Kion mi
bezonas, estas nur
ĉemizon !

Mi respondecas
pri via moralo antaŭ
la dio Volstrito.

Mi protektos
vin kontraŭ vi mem !

Jen vi volas,
tuj vi havas,
viajn potojn vi
faros mem !

Kioma sendankeco ! Li, kiu ĉion
devas al mi, kiun mi nutris ...

Ho jen, mia
kuracilo !

Je la matenruĝo :


Anselmo, rapide,
malsupreniru ! Vi devas fabriki
la ĉef-ĉapelojn por Bruĉanoj.
Ili alvenos morgaŭ ...

Mi volas po
 kvin gulbaroj tage kaj
unu ferian tagon
semajne !



KONKURENCO





Tiu malkovro, tiu **TEĤNIKA NOVAĴO** ruinigis en malmulte da tempo la industrion de la Iksbrulo de Bordurio ...



LABORMERKATO

Kion vi diras ? Vi estas potisto ? Neniu intereso. Ĉu vi scipovas kalkuli ?

Sed vi kalkulas per bazo dekdu. Nun ni kalkulas per bazo dek. Vi maljunas, kara !...

Kun ĉiuj tiuj modernaj teĥnikoj, oni ne povas sekvi la progreson.

Dum Lanturlop troviĝas sur la malfacila vojo de SENLABORECO, sur la bordo de l' lago, Sofio :

Kolego ! Depost ni mortigis la Krumirulon, kaj akiris la lagon, kio okazis ?

Ni fiŝkaptistoj, devis plu plenumi la laboron. Sed instaligis plena bando da profiteuloj, kaj niaj kondiĉoj novaj ne estas pli bonaj.


Aĥ, ne belas nia Koopera societo !

Kamarado ! Vi devas ne diri tion. La **KOLEKTIVO** estas batalo.
Batalas vi sur la fronto de produktado. Sed aliaj batalas sur
la fronto de la **POLITIKA KONSCIIGŬO** kaj sur la **PLANADO**.
Ni vivas ĉi tie en **PLANITA EKONOMIO** (*).

Hej ! Venu iome por vidi ilin,
viajn heroojn de la politika konsciigŭo !



Rigardu kiel ili plenŝtopas sin, kaj dormas !



Ili ne plenŝtopas sin. Ili gustumas.
Tio estas kvalitokontrolo.
Vi havas misvolan spiriton !



Kvalitkontrolo ?
Mi fajfas !

Por unu, kiu malfalse laboras,
estas dek, kiuj nenion faras
aŭ dormas ...

Ni pli bone vivas, ĉi tie,
kolektive. Ne estas
senlaboreco. Ĉiuj povas
trovi oficon.



Ne plu estas
riĉuloj.

Ne fidu lin Sofio.
Li anas al Sekureco.
Li estas danĝera.



Mi scias ĉion tion parkere. Tiu revolucio, Dio scias kiom mi volis ĝin.
Kaj kiam oni mortigis la Krumirulon, mi ne iris por plori apud li.
Sed kiel vi elturniĝas por eviti, ke tiom da homoj ĉi tie formu novan
kaston de nekapabluloj, mallaboremuloj kaj stultuloj, sed kun
«alta politika konscienco»... Kaj kial ili rabas la vostojn de la fiŝoj,
dum al ni restas nur la kapoj ? Kial tiuj **PRIVILEGIOJ**


Via malprogresema mensostato blindigas vin.
Vi devas konsideri la tuton, kaj ne fokusiĝi sur ĉiu okazo.

Sur la alia flanko de la montetoj, en Bordurio, regas
EKSPLUATADO DE LA HOMO FARE DE LA HOMO.



Do ĉi tie estas la reciproko !

Vi troas, mi estas
raportonta pri vi !..

al la **PATRETO DE LA POPOLOJ !**



ĈE LA REĜO NUMIS :




Estas facile por diri ... jes !



Ho jen viro, kiun oni kondukas al ekzekuto. Ŝajnas, ke la kulpo estas gravega, ili maldolĉe traktas lin. Terure !

Dekestro, kiu estas la kulpo de tiu viro ?

Ĉeko sen mon-provizo.



Iuj metas sian oron sekure en la grotojn de la montoj. Sed, malavantaĝe, tiu oro ne plu cirkulas. Oni ne povas uzi ĝin.



Jes pro tio interŝanĝoj iĝas malpli multaj.

Do kelkaj elpensis sistemon. Ili skribas sur peco el pergameno «kupono por havigi al la portanto tioman sumon da Gulbaroj», kaj ili subskribas. Ili nomas tion **ĈEKOJ**. Kompreneble la leĝo malpermesas je mortpuno eligi pli da ĉekoj, ol oni posedas gulbarojn en sia groto, en sia **BANKO**. Eblas pagi per tiuj pergamenoj.


Kaj tiam la homoj povas iri en la montoj por interŝanĝi la pergamenojn kontraŭ gulbaraj oramoneroj.




Mi dankas vin, dekestro. Sed iru por ripozi, nun. Ĉar vi devis forte mense peni por klarigi tion al mi.

AAAAAAHHH

Je Volstrito, mi baldaŭ suferos
la saman sorton, se mi ne elpensas solvon.





Hmm...



Sed !..



Mi trovis!!!!



MONPAPERO

Reĝa Moŝto ni estas kreontaj bankon,
kiun ni nomos «Burduria Banko»



Nu, mi ne vidas
kio estus la intereso.
Tio komplikikos al ni
senutile la vivon.

kaj tiam ni etendos
la ĉekan sistemon !

Unue ni akceptos en nia banko la tutan oron, kiun posedas niaj regatoj. Eventuale per «instigo» ... Interŝanĝe ni donos al ili paperojn kun la surskribo «kupono por havigi al la portanto tioman sumon da gulbaroj» Kaj ni aranĝos la aferon tiel, ke estos nur tiuj ĉekoj en cirkulo.



Sed ... ni ne pli riĉiĝos pro tio !?

Aŭ. ha jes, mi kredas, ke mi komencas pli bone kompreni la manovron.



Ankaŭ ni encirkuligos tiujn «paperajn gulbarojn». Kaj ili estos kompreneble pli multaj ol la «oraj gulbaroj».



Hm ... Ke niaj oraj gulbaroj perdadis pezon, tio iĝadis videbla, sed kiu scios, ke ni encirkuligos tiom da **MONPAPER**O ?

Tio estos la plej bela afero de ĉekoj sen mon-provizo en la tuta historio !

He, simia mono !



aĥg, mi tro parolis !

Kio ?

Nenio, ho reĝa moŝto ! ...

Atendu : se ni encirkuligos multe da paperaj Gulbaroj, homoj, kiom malspritaj ili estas, tamen suspektos ion. Kaj se la paperaj gulbaroj estas multaj, multe pli nombraj ol la oraj gulbaroj, estos neeble interŝanĝi ilin ĉiujn samtempe, po unu kontraŭ unu, kaj konservi la **PARECON**

Notu : mi ĉiam povas rifuzi tian interŝanĝon ...

Tio estigos panikon Moŝto, la homoj perdos entute **FIDON** en nia **PAPER A MONO**.


Se ni encirkuligos dufoje pli da paperaj Gulbaroj, ol ke ekzistas da oraj Gulbaroj, sufiĉos interŝanĝi ilin po du kontraŭ unu.

La homoj grumblos ...

Mi trovis, kion ni estas farontaj : kiam homoj estos konfidintaj ĉiujn siajn orajn gulbarojn, ni fandos ilin !

Kaj nu, kion tio rezultigos ?

ORON, tutsimple ...



Tiel komencis la plej vasta afero de ĉekoj sen monprovizo en la plena historio de l'reĝlando. Ĉio okazadis tiel, kiel estis planite.

Homoj alportis siajn orajn Gulbarojn, kiuj estis tuj fandotaj, kaj pri kiuj ne plu estis novaĵoj. La reĝo Numis presigis monbiletojn amase, kun tiuj oni tuj aĉetadis amason da aĵoj ie kaj tie. Kompreneble prezoj altiĝis, ankaŭ oro. Sed, ĉar ĉio estis pli multekosta, oni ne plus rekonis la malnovan borduran monon



Tiun aktivecon,
kiu kaŭzus al ĉiu ajna Bordurano
la pendumon, estis nomata
EKONOMIO.



Kompreneble, Numis
kondamnis al senhaŭtigo
ĉiujn, tiuj provis praktiki
mem EKONOMION.


Antaŭe, por preni al homoj ilian monon, estis necesa kolekti pezajn impostojn.



Numis konservis la impostan sistemon, sed danke al ebla ŝveliĝo de la **MONA MASO**, tiu **INFLACIO**, kiun li mastre regis, al li neniam mankis monpapiro. Kompreneble la prezoj paralele altiĝis, altiĝis.



Sed la ekonomia aktiveco en Bordurio, eniranta en la **INDUSTRIA ERAO**, ekprogresis. Ĉie estis konstruitaj fabrikoj, kie borduranoj nun laboradis nur kiel dungitoj. Numis kaj ties familio posedis la plejmulton de ili, aĉetitaj aŭ konstruitaj per la monpapiro.




Ĉar la prezoj altiĝadis, salajruloj emis peti plialtigon de iliaj salajroj. Kaj fojfoje akraj protestoj leviĝis.



Reĝustiĝoj, kiuj donis al homoj la impreson esti pli riĉaj, por momento.

Ha, tamen li ilin maltenis, siajn Gulbarojn.



Ni venkis!
Ni venkis!



Tiam la homoj impetegas en la magazenojn por aĉeti.




Zorgante **MAKSIMUMIGI SIAN PROFITON**,
tiuvespere, la komercisto altigis siajn prezojn.



~~800 G~~
900 G

Se ili plipetas da tion,
signifas, ke ĝi ankoraŭ ne
estas sufiĉe multekosta,
-leĝo de dio Volstrito!

Kaj vi devas kalkuli
kun la salajro de la
komisiito, kiun ni estis
devigitaj altigi.




Ju pli la kondiĉoj ŝanĝas,
des pli estas same.

Ne komprenas!

Ducent Gulbaroj! Antaŭ dek
jaroj mi perlaboris kvin!

Sed ... ĉu vi
vidis la prezojn?



900 G

Kia epoko !

Mi demandas min,
al kio tiros estas
kondukonta.

F-ino SOFIA
Trinkaĵoj por
ĉiaj uzoj

?

Sofio !

Anselmo !

Sed kion ja vi elfaras ?




Vi vidas, mi ŝanĝis pri metio.

Mi staĝis pri pararelaj sciencoj.

Kion vi riproĉas
al parapsikologio ?

Vi volas paroli
pri sorĉarto ?

Ho vi tuj uzas malfacilajn vortojn !



Riĉa aŭ ne, ne gravas, kondiĉe
ke oni havas monon ...



En tiu putrita mondo, mi vidas
nur unu aferon, kion oni povas
liberigi de la mona povo ...



Ĉu vi ne divenas kiun ? ...

Be ... ne.




Ha ... jes !



Finfine ...

Ni ĵetu
pudoran vualon sur tiu parto
de la rakonto ...







(*) Fama alĥemiisto.



Sofio ?

Mi estas
ĉi tie...




Sed diable kie ni estas ?

Ni ne ŝanĝis la lokon,
sed tiu stultula Anselmo
maldistingis la teon kaj la foliojn
de **ESTONTECODENDRONO**,
ni ŝanĝis la epokon.



Ĉu vi vidis tiun maŝinaron ?

Nu, kio ! Ĉu vi neniam vidis
EKONOMIAN MAŜINON ?



Sed... kiu parolas ?


Mi parolis. Mi nomiĝas Doktoro Tirezio.
Mi estas ekonomikisto ...

Ĉu vi elpensis kaj fabrikis
tiun maŝinon ?

Kaj kio estas tiu
aro da tuboj ?

Tute ne ! Mi nur studas ĝin.
Kaj skribas librojn por vendi.

Ili estas la **EKONOMIAJ
CIRKVITOJ**



En la tubaro,
la ekonomia fluaĵo,
la **SPEZAĴO**, estas movata
de du tipoj da Arkimedaj
ŝraŭbpumpiloj. La puŝanta
pumpilo nomiĝas
PRODUKTADO, kaj la
la sorbanto, nomiĝas
KONSUMADO.


La **SPEZAĴO** konsistas el
aera kaj **ERGOLA** (*) emulsio.
ERGOLO estas **NEKUNPREMEBLA**
fluaĵo. Sed la ĉeesto de vezikoj
igas la tuton
KUNPREMEBLA.

Inter la **PRODUKT**- kaj
KONSUM-pumpiloj, oni loĝigis


fenestron, kiu ebligas
taksi la **DENSECON**
de la ekonomia fluido.

(*) De **ERGOS**, en la greka «laboro».

UNUA LEĜO DE LA SPEZAĴODINAMIKO



La rapido de la pumpilo **PRODUKTADO**, tio estas la **OFERTO**; dum la rapido de **KONSUMADO** estas la **MENDO**.




Kiam tiuj du rapidoj ekvilibras unu la alian, aŭ kiam ili varias sammaniere, **SINKRONE**, la **SPEZAĴO** gardas senŝanĝan densecon : La **PREZOJ** estas **STABILAJ**.



Kiam la **KONSUMA** pumpilo ektiras pli, kaj kiam la **PRODUKTADINTENSECO** ne sekvas, tiam la **SPEZAĴO** maldensiĝas; ties premo malaltiĝas, kaj **PREZOJ** **ALTIĜAS**.


Atendu ...



Kaj kiam, anstataŭ kreski, konsumado **MALAKCELIĜAS** ?

Nu la **SPEZAĴO** iĝas pli densa : la prezoj **MALALTIĜAS**

Estas la sama afero, kiam en konstanta **KONSUMA** grado, la **PRODUKTADO** malakceliĝas : la **SPEZAĴO** ekspansias, kaj la prezoj suprenflugas. Kiam **PRODUKTADO** akceliĝas, **SUPERPRODUKTADO** kunpremas la **SPEZAĴON**, kaj prezoj malaltiĝas.




Tiel la prezoj **AŬTOMATE**
determiniĝas laŭ la rilato inter
KONSUMADO kaj **PRODUKTADO**,
inter **MENDO** kaj **OFERTO**

Tra la
PRODUKTAD-pumpilo
pasas certa **MASO** da
ERGOLO en sekundo.
Tiu **FLUMASO** estas la
sama, kiu trapasas en la
KONSUMAD-pumpilo.

Kaj la rilato, ĉe la konsumad-pumpilo,
inter la **FLUKVANTO** en **VOLUMENO**,
kaj la **FLUKVANTO** en **MASO** da **ERGOLO**
nomiĝas **PREZINDICO**.


Ni ekzamenu tiun **EKONOMIAN MAŜINON**
de pli proksime.

Ĝi similas maŝinon
por ĉiama movo.





Ne estas maŝino
por ĉiama movo.



Kion mi diris,
mi nur opiniis ...

Estas frotoj en la duktoj, perdoj en la elektraĵ lineoj.
La tuto funkcias nur danke al enporto de **ENERGIO**.

DUA LEĜO DE LA SPEZAĴODINAMIKO

La duan leĝon de
SPEZAĴOdinamiko oni povas esprimi
tiel : **NE POVAS EKZISTI IZOLITA
EKONOMIA MAŜINO.**

La homoj ne povas
nur aĉeti kaj vendi objektojn.
Necesas, ke ie iu efektivigu ian
PRODUKTIVAN LABORON,
surbaze de materialoj kaj
energio, sub ajna formo.

Memkompreneblas.

PRODUKTIVA SEKTORO KAJ NEPRODUKTIVA

KRANOJ por
SALAJROJ

PRODUKTAD-
APARATO

PRODUKTIVA
SEKTORO

SERVOJ


Parton de la **SPEZAĴO**
oni direktas en la salajraj-
turbinojn, kiuj provizas la
dinamojn de la konsumo.

Kelkaj estas ligataj,
rekte kuplataj al la
PRODUKTAD-APARATO, ili
konsistigas la **PRODUKTIVAN**
SALAJRAN SEKORON.


Tial kiam ili turnas la radon de tiu turbino
salajruloj diras, ke ili laboras kiel azeno.

Ĉio ĉi ŝajnas al mi sufiĉe bone elpensita.
Kie sidas la problemo ?

PRODUKTIVECO




Nu, la EKONOMIA AKTIVECO egalas al :
 $\frac{1}{2}$ ERGOLA MASO $\times$ (CIRKULADA RAPIDO)²



Mallonge estas la KINETA ENERGIO.




Por altigi la ekonomian aktivecon, oni povas pligrandigi la **ERGOLAN MASON**, t. e. la **KVANTO DE PROVIZITA LABORO**. Sed ankaŭ estas gravege plibonigi la manieron per kiu tiu laboro estas uzata kaj distribuata, tio estas la **PRODUKTIVECO**.




Jes, pli bone estas transigi al maŝino pli dika, pli moderna, kun tuboj pli granddiametraj kaj elektraj konduktiloj kun pli ampleksa sekco-areo, ol duobligi aŭ triobligi la malnovajn instaladojn.

Afero, kiu restas ege mistera por mi :
kio fiksas la volumenon de **SPEZAĴO** en la tuto de la ekonomia maŝino ?




KRESKO KAJ MONA MASO

La **REALA** stato de **EKONOMIA SISTEMO** estas la **MASO DA ERGOLO**, kiu cirkulas en ĝi. Tio estas la densa parto de l' **SPEZAĴO**, la laborforto plus la **CIRKULADRAPIDO** de tiu **ERGOLO**. Kio okazas, se oni aldonas novan **PRODUKTAD-ELEMENTON** al la maŝino ?






Tiu produktilo estas provizata kun plena tenujo da **ERGOLO**. Tial altiĝas la **LABORFORTO**, kio rezultigas pli altan **SPEZAĴODENSECO** (do emas malaltigi la prezojn). Estas do normale, en fazo de kreskado, aldoni kelkajn vezikojn, tio estas kreskigi la **MONAN VOLUMENON**, cele al konservo **PREZSTABILECON**.



Fakte mi vetas,
ke vi ŝtele aldonas iom da vezikoj pli,
por vin kompensi de la salajro-altigoj.


Bone, ni supozu, ke ni estas en kreskofazo. Makso, vi ludos la rolon de salajrulo de l'produktiva sektoro kaj vi Alberto tiun de salajrulo de la neproduktiva sektoro.




Kial neproduktiva ?

Vi konsistigos la **SERVOJN**, la **ADMINISTRANTARO**

Bone, nova produkta establo estis aldonita al la ekonomia maŝino. Kaj ĉio iras glate. La mezurilo de ekonomia premo montras pliajn dekdu barojn




La enfunkciigo de tiu establo provizos **LABORPOSTENOJN** et malgrandigos **SENLABORECON**. Sed la prisalajra postulado plifortiĝos.



Ni postulas plialtiĝon de l'flukvanto !

Bone ! Mi sendas plialtiĝon de flukvanto.



Pri **PREZOJ**... ĝustas... nerapide....

Intenseco kreskas. Ne tro da perdoj en la **DISTRIBUA CIRKVITO**.



La **ERGOLA** flukvanto en la distribua pumpilo kreskas. La **VIVNIVelo** altiĝas.

Sed tiu produkt-establo
ne fariĝis mem ?

Vi pravas. Necesas elpreni
parton de la viva forto, de la
kineta energio de l' **SPEZAĴO**,
por irigi la **ENNOVAĴOJN** kaj
modernigi la **PRODUKTADO-**
rimedojn

iNVESTOJ

**ENNOVAĴOJ
MODERNIGO**

Mi jenas !

Tia penado devas
esti konstanta, alie
la produktad-maŝino
neeviteble kadukiĝos.


Fuŝa maŝino.

Tuboj
ŝtopiĝas.

Elektraj cirkvitoj (**DISTRIBUAD-RETO**)
formanĝiĝas pro l'uzado : Estas energiperdoj ĉie.

**PATAKLOK
PATAKLOK**


KAPITALO, PROFITO, IMPOSTOJ KAJ ŜPARAĴO




La cirkulado de l' **SPEZAĴO** estas ŝarĝita de multaj kromvojoj kaj preperdoj diversaj. Tuj alvle de la produktad-pumpilo, la **ERGOLO** turnas turbinon kuplatan al generatoron. Parto de la tiamaniere forprenita energio, estas sendita en cirkvito nomata **SOCIALAJ KOTIZOJ**. Alia parto iras al **PRODUKTKOSTOJ**, kaj la cetero utilas por varmigi la piedbanujon de sinjoro **LUK' RISTO**.

Jen unuflanke sinjoro
LUK' RISTO...

Kaj aliflanke la cirkvito de
l' SOCIALAJ KOTIZOJ.




SOCIALA
SEKURECO




PENSIOJ

FAMILIA
ATRIBUAĴO



SENLABORULA ASEKURO



KAPITALO

En rezervo-tenujo, S-ro LUK'
RISTO stokas la SPEZAĴON,
tiel transformante la kinetan
energien ERGOLAN en potencialan
energien : KAPITALO.

ŜTATBANKA KREDITO

INTEREZOJ AL BANKOJ

INVESTOJ

POSTIMPOSTA PROFITO


ŜPARADO

AL ENNOVAĴOJ
kaj MODERNIGO


La **KAPITALO**-kuvo estas plenigata de la **POSTIMPOSTA PROFITO** kaj de io, kion oni nomas **MONŜPARADO**.

Kaj inverse la **SPEZAĴO** de tiu rezerv-tenujo povas esti sendata al du turbinoj, kuplataj al generatoroj. Unu funkciigas mian maŝinon, tiun de novkreivo kaj moderneco. La alia estas nomata **KOMERCA KREDITO**


Siaflanke la **FINANCMINHISTRIONO** posedas kason sufiĉe similan. Li nutras ĝin per **IMPOSTOJ**. Li elprenas unue survoje **IMPOSTON SUR LA PROFITO**. Poste **SENPERAN IMPOSTON ENSPEZAĴOIMPOSTON**, kaj fine almonte de la **KONSUMADA PUMPILO, PERAN IMPOSTON**, ekzemple **ALDONVALORA IMPOSTO**.




Jen la
ŜTATAJ ELSPEZOJ.





ARMEO




EDUKADO/ ESPLORO



SOCIALAJ HELPOJ



Kaj tio mi konjektas estas
la **ĈARO** de l'**ŜTATO** ?




Kaj **ŜPARADO, KREDITO,**
kiel tio funkcias ?



Teorie ĉiuj tiuj rezerv-tenujoj, kiaj estas
la **KAPITALO** la la **ŜTATKASO** havas utilon
REGULIGAN. Ni jam vidis, ke la **EKONOMIA MAŜINO**
estas **MALSTABILA**, pro tiu konstanta interago inter
PRODUKTADO kaj **KONSUMADO**, ĉar tiu ĉi
konstante emas senbridigî kaj altigi la **PREZOJN**.



Do oni instigas la salajrulojn al meti sian
SPEZAĴON en tiujn du rezerv-tenujojn ...




Kial vi ne partoprenus en tiu admirinda kreskado niaekonomia. En mia **SPEZAĴOTROGO**, mi ofertas al vi propran fakon (*) en kiun vi povos meti vian. La nivelo sekvos la ĝeneralan altiĝon de la **KAPITAL**-nivelo.



Vi riskos nenion. Mi garantias al vi certan jaran interezon. Laborigu vi vian **SPEZAĴON**

Danke al tiuj konfidaĵoj, ni povos investi, kaj modernigi nian ekonomian maŝinon.



Sekurigi vian **SPEZAĴON**. Pensu pri la **FUTURO**. Mi garantias certan jaran interezon. Kaj se vi konfidas al mi viajn ŝparaĵojn sufiĉe longe, mi faros al vi afablan geston koncerne viajn impostojn.

Danke al viaj konfidaĵoj ni povos investi, kaj modernigi nian ekonomian maŝinon.




Hmm...



(*) Privata banko, akcioj.

IOM DA TEMPO POSTE ...

Ili ne donas multon.
Sed, vidu, ni tamen iomete
gajnis laŭ la volumeno.




Vi estas tre naiva. Ekonomia aktiveco
kreskas. La ekfunkciigo novajn
produkt-establojn iras kune kun kreskado
de la **ERGOLA** maso. Sed ili metas tiom
da aervezikoj ene, ke la **DENSECO**
de l' **SPEZAĴO** daŭre malaltiĝas,
kaj ĉion konsiderante vi perdas.

Ĉu vi volas diri, ke en tio,
kion ni ŝparis, la kvanto da
ERGOLO, la solida parto de
l' miksaĵo, **MALKRESKAS**
anstataŭ kreski ?!...



Ne estu naiva !

Sed niaj salajroj altiĝis. La flukvantoj
preskaŭ duobliĝis ! Rigardu ...



Sed tio, por kio vi turnas
turbino estas **VENTO**,
SPEZAĴO malpli kaj malpli
densa. Rigardu l'intensecon !

KONSUMADA
PUMPILO




Ĝi tre malmulte pligrandiĝis ...

La malfalsa **EKONOMIA KRESKADO** ne estas tiu
de la volumo de l' **SPEZAĴO** kirlata, sed de la **ERGOLO** kiun ĝi entenas.
Same altiĝo de l' **VIVNIVelo** ne estas la **FLUKVANTO**
(salajro) sed l' **INTENSECO** (**AĈETPOVO**)





Ĉu ne estas alia rimedo
ŝpari sian **SPEZAĴON** ?

Por stoki ĝin kun
KONSTANTA MASO,
sufiĉas ĝin **FROSTIGI**.





Bonegas la ideo !

Por sin savi el **INFLACIO**,
tiu plago, kiu rodas la ŝparaĵojn,
sufiĉas ĉion frostigi !



Sed tiam la **SPEZAĴO** perdas
sian intereson, kiu estas en ĝia **FLUECO**.
La **KAPITALHALTIGO** ŝtopas la ekonomian maŝinon.






La kaldronego de la ekonomia maŝino estas varmigata pere de tiu utilega likvaĵo, kiu venas de malproksima kaj dezerta regiono. Por ĝin venigi, necesas elspezi grandan kvanton da energio.
(NAFTO-FAKTURO)



Kompense, cirkvito venas de l'dezerto kaj iom nutras la konsumad-pumpilon (EKSPORTOJ) (*).



(*) La TUTMONDIĜON DE EKONOMIO ni pritraktos en alia albumo.

LA NAFTOŜOKO

Nu, jen la FINANC-MINHISTRIONO.



Ni legu la leteraron.



Diable !..



Diablege !..



Ili altigis la prezojn !

Hej ! Mia piedbano malvarmiĝas !



PRODUKTKOSTOJ

Normalas. La tutan kurenton elĉerpigas la cirkvito de PRODUKTKOSTOJ



SOCIALAJ KOTIZOJ

Hej, homoj ! La turniĝrapido
kaj premo malaltiĝas.

Kio okazas ?

Luk' Risto eksfunkciigis la
produktetablojn kiuj ne
estas **PROFITDONAJ**.

SENLABORECO kreskas.

Kion vi faras ?

Pli bone aĉeti antaŭ
ol prezoj ree altiĝos.
Mi eltiras mian ŝparaĵon,
kaj **PRUNTEPRENAS**.

Kaj kion faras Luk' Risto ?

Ĉu vi volas diri,
ke Luk' Risto faras
falsan monon ?

Mi konjektas, ke li kaŝe
enigas iom da aero en sia kuvo
(**INFLACIO PER KREDITO**)

Ne, ne ekzakte ... Sed tiu
BANKSISTEMO, ĉiuj ĉi paperoj,
kreditsindevigo ĉio ĉi fine eksimilas
treege al mono. Kaj se iam oni kontrole
malplenigu la kuvon de Luk' Risto,
oni spertus certan surprizon ...

Uzado **KREDITON**
kaj perdo **FIDON** senbridigis
KONSUMADON. Prezoj ardas ...

API

Endas haltigi tiun vetkuron al kredito ...

Luk' Risto pruntedonas
tro da **SPEZAĴO** al la publiko.
Sed, nu, ankaŭ mi pruntedonas al li.

Do, ĉiuj pruntedonas al ĉiuj ?

Bof, vi sciu, en ĉiuj tiuj pruntoj estas multe da vento.

Mi malvastigos
lian krediton, tiel li
pripensos pli, antaŭ
ol pruntedoni amase

Bone, ni iom bridis tiun kredito-aferon.
Sed la nivelo de la **ŜTATKASO**
malleviĝas rapidege...

Kion fari ? Altigi
la enspezimposton ? ... la perajn
impostojn ? ... la imposton sur la
profitoj de entreprenoj ? ...

Hej, kio pri
miaj investaĵoj !!

Nu, ĉiujn impstojn !...

Ni postulas ke
vi plialtigu la flukvantojn !

S-ro la **FINANC-MINHISTRIONO**,
la premo en la tuboj falas,
la **BAROMETRO** malleviĝas.

Kaj la kaso preskaŭ malplenas !

Kio estas tiu damna umo !?!

IMPONECO

Tio estas granda elektrolumigilo,
nutrata de la ŝtatkasos.

Tiel ni estas vidataj
de malproksime.

IMPONECO

Kio !? Estingu tion tuj,
alimaniere ni ruiniĝos !

Plavastigu la flukvantojn,
se ne ni ĉesos turni
la **TURBINON**.

Jes, jes ... baldaŭ.

Nur unu solvo restas.



Kion faras la MINHISTRIONO ?

Li konektas tiujn
amplersajn kuvojn al
la SPEZAĴO-cirkvito

Tiel nutranta la
ŜTATKASON

Tiuj tenujoj aspektas vastegaj.
Tion oni ne esperis, ni fidiĝas.
Sed kio povas esti ene ?

Mi ja nenion
scias pri tio.

Ha, jen finfine
tiuj flukvantaj altigoj.
Ni tiom atendis !

ŬVRAŬRR

Supera intenseco.
La konsumada pumpilo
rulas fekbone.

Hej, singarde ! Prezoj !!!

Nu, ne gravas, la maŝino
pli bone turniĝas, la pumpiloj fluigas.

Jes, sed, vidu : intensecoj falas, ĉie !

Tio ne estas normala.
Ni turnas la turbinon plenbrake,
kaj ŝajnas ke vane.

Kion la MINHISTRIONO
metis en la ekonomian fluaĵon ?!?!

Iru ni rigardi en tiuj kuvoj.

Ĉu pordo ?

Ni eniru.

MALPLENA !!!

Ĉu vi celas diri, ke tiuj kuvoj
estas JAM malplenaj ?

Ne, ili **ESTIS ĈIAM MALPLENAJ !**

Kiam aferoj aĉiĝas,
ĉiuj financminhistrionoj agas tiel.
Ili enigis egan vezikon da **VENTO**
en la cirkvitojn. En la komenco,
tiu puŝas la **SPEZAĴON**,
iaspeca **SPRONO**.

ŜPARAĴOJ malvaloriĝas.

Fek, ankaŭ mi eltiros
miajn ŝparaĵon.

Iaspeca
EKONOMIA MALPLENO ?

Malfalsa **NENIO** ?

Sed ĉio ĉi homogeniĝas,
kaj la rezulto estas,
ke la **SPEZAĴO** maldensiĝas.

Prezoj altiĝas.

Ankaŭ **KAPITALO** ...

LUK' RISTO !

Kapitalfuĝo ! Ho fiulo !!!



Ni feliĉe alvenis antaŭ la tempo !




Luk' Risto, mi bezonas
viajn kapitalojn.

Ne infanu !

Kien li iris ?



Kio ?
Frostigitaj !!!



Li lasis leteron ...



Haltigu la salajrojn, malaltigu la impostojn
pri profitoj de entreprenoj kaj la socialajn
kotizojn, kaj donu al mi subvenciojn por investi.

S-ro Luk' Risto.


Sed... **AĈETPOVO** estus falonta. Homoj estus grumblontaj.
Kaj la konsumad-pumpilo estus malrapidiĝonta.



Unuavice ni domaĝu iom
tiun damnindan nafton !



Tiu **SPEZAĴO** valoras nenion.
Pligrandigu la flukvantojn tuj !!



Ni jam diris tion !

Freneza !


Estonta
ruiniĝo ! ...

Cetere
kiam estis
mi minhistriono,
aferoj ne pli
malbonis ...



EPILOGO


Jen plia produkt-establo,
kiun oni malŝaltis.



Oni devus
konstrui alian ...
multajn aliajn ...




S-ro Minhistriono ...





Kion se mi kreus alian ministrejon ?
... aŭ ŝtatskretariejon ?

Jes ?

S-ro MINHISTRIONO,
ununura solvo estas antaŭeniri.
Necesas **ENNOVAĴOJ**, elpensi
produktilojn modernajn.



Necesas laborigi **IMAGPOVON**.



La problemo, en nia lando, estas la **ENCIRKVITAJ PERDOJ** ...



FINO